

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

**Vicredaktoro:**

Katalin Kováts

**Kunlaborantoj  
de la aktuala numero:**

Jennifer Bishop

Reza Kheir-khah

Boo Mee Kim-Lindblom

Géza Kurucz

Stefan MacGill

Rob Moerbeek

Luiza Oberrauch Madella

Atilio Orellana Rojas

Radojica Petrović

Derek Roff

Hamzeh Shafiee

Jan Strydom



**Interkulturo denove!**

(p. 1.)



**Seminario en Hungario**

(p. 15.)

**ilei**

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj



## ENHAVO

Radojica PETROVIĆ: <i>Interkultura edukado per interreto kaj Esperanto</i> .....	1
Jan STRYDOM: <i>La psikologio: obstaklo en la vojo de Esperanto</i> .....	4
El la landoj kaj sekcioj (AL, AU, BR, CN, FI, FR, DE, HU, LT, NL, PL, RO, RU, SE)..	9
Derek ROFF: <i>Muzika sidado (el nia por via LERNILOTEKO)</i> .....	20
Por via notlibro ( <i>Fondaĵo EDUKADO, LERNU.NET, Komputilaj ludetoj</i> ).....	23
<i>Someraj aranĝoj en Svedio</i> .....	24
<i>Memore pri Hans ten Hagen</i> (Rob MOERBEEK) .....	27
<i>Pri Juna amiko</i> (Stefan MACGILL, KURUCZ Géza).....	29
<i>Etvortaro de Ilona Koutny</i> (recenzo de Stefan MACGILL).....	31
<i>Financa raporto de ILEI, estrara alvoko</i> (Boo Mee KIM-LINDBLOM) .....	32

Kovrilpaĝe: (*Supre*) E@I-IK-oficejo: Radojica PETROVIĆ (projektkunordiganto), Hokan LUNDBERG (paĝar-kunordiganto), Sonja PETROVIĆ (metodikulo) kaj Nastja KOJEVNIKOVA (aspektigisto).  
(*Malsupre*) Modelleciono dum Pedagogia Tago 2002 en Budapeŝt

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.  
Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.  
<latorre.mauro@uniroma3.it>; <http://il.uniroma3.it>  
*Kunordigado, rilatoj kun E-organizoj.*

**Vicprezidanto:** Stefan MacGill, Pannonia u. 30 / I / 6, HU-1136 Budapeŝt.  
Tel. (+36 1) 349-5207 <stefan.macgill@galamb.net>  
*Eldona agado (inkl. periodaĵojn).*

**Sekretario:** Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150) 52387 kaj (+46) 708152387 (mesaĝoj).  
<agneta.emmanuelsson@liberal.se>  
*Membraro, sekcioj, komitato.*

**Vicsekretario:** (*vakas!*)

**Estrarano pri financoj:** Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175,  
<boomee.kimlindblom@swipnet.se>

**Estrarano:** Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>  
*Lernejaj projektoj, universitata agado.*

## Interkultura edukado per interreto kaj Esperanto

La projekto Interkulturo eniris novan fazon (IK2) gardante la esencajn ideojn kaj celojn de origina Interkulturo (nun referencata kiel IK1) lanĉita en 1999 kaj vaste akceptita en 2000 kaj 2001. Metodologie kaj teknike IK2 alportas ion novan. Pli grave, ĝi kunlaborigas fortojn de kvar institucioj de E-komunumo, kaj tio estas garantio de ĝia sukceso: ILEI kaj E@I provizas la laborfortojn, ESF finance helpas, kaj UEA fonas kun organiza subteno konforme al sia strategia laborplano. Ĝia ĝisnuna kaj aktuala evoluo resumeblas jene:

- En septembro 2002, Mauro La Torre kaj Radojica Petrović prezentis al la Estraro de ILEI refunkciigan projekton de Interkulturo – IK2.
- En novembro 2002, Hokan Lundberg kun sia E@I-teamo el TEJO proponis novan projekton de repaĝaro por Interkulturo.
- En decembro ni akordigis la du projektojn kaj proponis laborteamon de plenumontoj. La Afrika Oficejo de UEA, gvidata de Gbeglo Koffi, transprenis la taskon de sekretariado pri aliĝantaj klasoj.
- En januaro 2003 ILEI prezentis subvencipeton al ESF por Interkulturo.
- En februaro ESF aprobis subvencion por la unua paŝo de IK2 ĝis fine de junio 2003. Depende de rezultoj de la unua paŝo, ESF decidis pri eventuala daŭrigo de la subvencio.
- En marto estis luita kaj funkciigita retregiono *interkulturo.net*, kun viziteblaj informpaĝoj pri IK2 kaj prezentaĵo pri planata paĝarstrukturo. Testataj estas traduksistemo, forumo kaj viki-paĝoj. Ĉi-lastaj estas populara engaĝigilo kiun facile uzos partoprenantaj klasoj.
- Kerno de la laborteamo kunsidis en Beograd, 21-23 marto 2003, pritraktis metodikajn, prienhavajn, teknikajn kaj organizajn demandojn de la projekto, aprobis prioritatojn de la unua paŝo, kaj difinis taskodividon kaj dinamikon de la realigado.
- Fine de marto estis senditaj monpetoj al Eŭropa Junulara Fondaĵo, neesperantistaj fondaĵoj por IK-trejnseminario en Sarajevo, marto 2004, kaj por esperantigo de gvidlibro (T-kit) pri interkultura edukado eldonita de Konsilio de Eŭropo. Monpeto por IK-trejnseminario en Brazilo, decembro 2003, estos sendita al alia Eŭropa fondaĵo ĝis junio.



- Evoluon de la projekto eblas sekvi ĉe [www.interkulturo.net](http://www.interkulturo.net), kaj diskuti pri ĝi tra retlisto [interkulturo@yahoo.com](mailto:interkulturo@yahoo.com). La labor-teamo havas sian internan retliston [teamo@interkulturo.net](mailto:teamo@interkulturo.net).
- Presinformiloj de Interkulturo daŭre estos Juna Amiko por la plej juna celgrupo, Kontakto por la TEJO-aĝa celgrupo, kaj IPR por la instruistaro.

La esenca celo de Interkulturo, dekomence kaj plu, estas interkultura edukado per Esperanto. Per ĝi realiĝas la interna E-movada celo: popularigado de lernado de Esperanto en lernejoj, ĉar ĝi plimotivigas la lernantojn kaj instruistojn donante ŝancon por inspira, amuza kaj plursence utila praktika uzado de la lingvo. Nun la celgrupo de IK2 plilarĝiĝas al eksterlernejaj kaj pli aĝaj grupoj de junuloj, ne forlasante la bazlernejanon kaj mezlernejanon. En posta evoluo IK2 eĉ ofertas siajn servojn al studentoj de aliaj lingvoj kaj tiel kontaktigos ilin kun la valoroj de Esperanto kaj varbos por ĝi.



*Hungaraj E-instruistoj dum seminario en Budapeŝto (de maldekstre: Ködmön Károlyné, Soós Károly, Tötösné Gados Zsuzsa, Kovács Márta, Tihanyi Péter)*

Laŭ la antaŭaj spertoj, daŭran realigadon de la difinitaj celoj de IK1 malhelpis manko de plene ellaborita interkultura metodiko, ne sufiĉa nombro de trejnitaj interkultur-edukantoj, kaj manko de homfortoj por aktualigado de ĝia retpaĝaro kaj konstanta kunordigado de interkultur-esploraj aktivaĵoj de la partoprenantoj. La teamo de IK2 serioze prikonsideris tiujn problemojn kaj decidis prioritare, ĝis la fino de junio 2003:

- Ellabori metodikon;
- Krei paĝaron kiu enhavos necesajn metodikajn materialojn (gvidlinioj, ekzercoj, taskoj, lernmaterialoj ks.) kaj estos kongrua kun la ellaborita metodiko;
- Starigi kontaktojn kun provklasoj kiuj aŭtune 2003 testos la metodikon kaj la novan paĝaron.

Komence de aŭgusto, dum la 36-a Konferenco de ILEI en Örestrand, Svedio, okazos la unua trejnseminario por klasgvidantoj (IK-gvidantoj) kaj helpantoj de Interkulturo (IK-helpantoj). La trejnitoj aŭtune gvidos eksperimentajn klasojn kiuj mem kreos siajn TTT-prezentaĵojn en la nova retpaĝaro, kaj organizos interklasan esplorinterŝanĝon testante la paĝaron kaj metodojn kiuj ĝis tiam estos kreitaj. Gravan rolon havos IK-helpantoj, kiuj kunordigos esploraktivaĵojn en certa temkampo, kaj metodikaj konsilantoj kompetentaj pri interkultureduka metodologio.

La ceteraj klasoj kiuj jam aktivas en Interkulturo aŭ dume aliĝas, daŭrigos siajn aktivaĵojn kiel ĝis nun, uzante la paĝaron de la Kvazaŭa Lernejo „Tibor Sekelj” kaj retpoŝtan komunikadon, se ili ne havas retaliron. Pri tiuj klasoj zorgos la Afrika Oficejo de UEA kunlabore kun ILEI kaj kun la teamo de IK2. La nova paĝaro, metodologio kaj reto de IK-helpantoj kaj konsilantoj devus esti testitaj ĝis la fino de 2003 kaj pretaj por plena aplikado kaj plua evoluo en 2004.

Interkulturo vekas intereson ankaŭ ekster la esperantistaj rondoj. Prelego pri ĝi estas akceptita por Unesko-Konferenco pri Interkultura Edukado kiu okazos en Finnlando meze de junio. Aliaj prelegoj pri esperantistaj projektoj de interkultura edukado kaj perkomputila lingvolernado estas anoncitaj por la Dua Internacia Konferenco de Acodden-Reto „Diverseco kaj Civitaneco – Defio por Lernejoj” en Florenco, Italio, komence de



julio, kaj por Kongreso de FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj) en Johanesburgo, Suda Afriko, meze de julio.

La komenca kaj espereble pilargigota **teamo de IK2 konsistas el:** *Mauro La Torre* (edukscienca esplorado, metodologia konsilado), *Radojica Petrović* (ekstera kunordigado, informado, esplorado), *Stefan McGill* (metodiko por infanoj, lernmaterialoj, paĝaraj helptekstoj), *Boo Mee Kim-Lindblom* (kasisto), *Sonja Petrović* (interna kunordigado, monpetoj, IK-helpanto), *Ralf Frölich* (konsilado pri metodiko, monpetoj kaj publikaj rilatoj), *Hokan Lundberg* (planado kaj programado de la paĝaro), *Nastja Kojevnikova* (aspektigado de la paĝaro kaj informmaterialo), *Clayton Smith* (konsilado pri programado kaj ekde majo programado), *Brion Vibber* (programado, speciale pri la vikio-partoj), *Helen Claesson* (desegnado), *Torun Jansson* (IK-helpanto), *Jevgenij Gaus* (IK-helpanto, provklaso), *Haris Subašić* (programado, provklaso), *Rafael Despradel* (provklaso), *Katja Ignatjeva* (IK-helpanto).


Novaj gvidantoj de provklasoj, IK-helpantoj kaj interkultur-metodikaj konsilantoj estas bezonataj. Sinanoncoj bonvenos.

*Radojica Petrović*, <[radojica.petrovic.interkulturo.net](mailto:radojica.petrovic.interkulturo.net)>

\*\*\*

**D-ro Jan Strydom:**

## **La psikologio: obstaklo en la vojo de Esperanto**



Ekzistas multaj obstakloj kiuj malhelpas, ke Esperanto atingu sian celon fariĝi la komuna lingvo de la tuta mondo. Unu el tiuj estas la psikologio kaj ĝia eksterleĝa infano, la psikiatrio.

La celo de Esperanto estas fariĝi la dua lingvo de ĉiu homo. La plua ekzisto de Esperanto do dependas de dulingveco — eĉ de multlingveco, ĉar estas universala fenomeno, ke esperantistoj plejofte estas multlingvuloj. Alia distingaĵo estas, ke esperantistoj ofte multe legas. Ajna afero

do, kiu endanĝerigus la multlingvecon kaj la legokapablon de homoj, samtempe ankaŭ endanĝerigus la progreson kaj la estontecon de Esperanto.

Ĝuste tion faris la psikologio.

## **LA PSIKOLOGIO ENDANĜERIGIS MULTLINGVECON**

Jam dum multaj jaroj mi esploras la fenomenon, ke pli kaj pli da infanoj ĉie en la mondo havas diversajn problemojn, inter kiuj legoproblemoj estas la ĉefaj kaj la plej oftaj. Antaŭ unu-du semajnoj mi intervjuis gepatrojn, kies juna filo havis gravajn problemojn pri la legado, kaj ankaŭ pri la lernado ĝenerale. Rimarkinde estis, ke la patro estis anglaparlanta dum la patrino havis la afrikansan kiel sian gepatran lingvon. Mi enketis, ĉu ili parolas ambaŭ lingvojn al la knabo. Ili respondis, ke psikologo avertis ilin pri la danĝero paroli en pli ol unu lingvo al infano.

Dum longa tempo en la pasinta jarcento psikologoj ĵuradis, ke dulingveco — por ne paroli pri multlingveco — estas danĝera je la konkapabloj de infano. Krome, ili prognozis skizofrenion kaj perturbitan personecon se oni lernigas al infano pli ol unu lingvon.

De kie kaj kiamaniere tia frivola ideo povus esti enveninta en la kapon de homoj — kaj precipe de homoj kiuj alrigardas sin kiel scienciston — estas tute nekompreneble. Tio subtenas la vidpunkton de Popkin kaj Stroll<sup>1</sup>, ke ĉiam estas homoj kiuj pretas akcepti ĉiun ajn vidpunkton. Neniam estis ideo tiel absurda, ke ne troviĝis iu kiu kredis kaj apogis ĝin.

La historio abundas je ekzemploj kiuj oponas la psikologian ideon pri dulingveco. Unu el la plej klaraj, laŭ mi, estas tiu de Johann Wolfgang von Goethe, kiu jam kiel kvinjarulo povis paroli, legi kaj skribi la germanan, la francan kaj la anglan, kaj povis legi kaj skribi la latinan kaj la grekan. Laŭ Vildomec<sup>2</sup>, Prévost avertis, ke la ellernado de dua lingvo

<sup>1</sup> Popkin, RH, kaj Stroll, A: *Philosophy Made Simple* (London: W H Allen, 1969)

<sup>2</sup> Vildomec, V: *Multilingualism* (Leiden: Sijthoff, 1971)



estus malavantaĝa je la profundeco de la pensado, kaj ankaŭ kaŭzus, ke la emocia valoro de vortoj perdiĝus por la koncerna infano. Nur persono, kiu neniam legis eĉ unu ekzempleron el la mirinda verkaro de Goethe povus imagi, ke lia pensado estis malprofunda, kaj ke li ne konsciis pri la emocia valoro de vortoj.

Malgraŭ tiu — kaj multaj aliaj — ekzemploj el la historio, la psikologia ideo pri dulingveco estis konsiderata kiel vero tiom evidenta, ke nur frenezulo povus pridubi ĝin. Ne estas mirige, do, ke la historiisto Carver<sup>3</sup> diris<sup>3</sup>, ke la sola afero kiun la homo lernis el la historio estas, ke li lernas nenion el la historio. Tial ankaŭ la historio de la scienco estas plenŝtopita de ekzemploj de teorioj je kiuj la plej saĝaj homoj tutkore kredis, kaj poste tiuj teorioj komplete renversiĝis. Esploroj dum la 60-aj jaroj en Kanado kaj aliloke jam havis tiun efikon je la psikologiaj ideoj pri dulingveco, kaj postaj esploroj konfirmis la senbazecon de la antaŭaj ideoj.

Bedaŭrinde, tamen:

- ankoraŭ restas psikologoj kiuj ne eksciis, ke tiuj antaŭaj teorioj estas nur sensencaĵoj; kaj
- neniuj, ŝajne, pripensis la fenomenon — aŭ maltrankviliĝis pro ĝi — ke tiaj evidentaĵoj neveraĵoj povas tiel facile firmiĝi en la mensoj de sciencistoj; kaj
- ŝajne ĉiuj estas kaj restas tute indiferentaj pri la detrua efiko kiun havis kaj havas sur la vivo kaj estonto de miloj da infanoj tiaj transkapiĝaj ideoj kaj la rezultaj edukaj agmanieraĵoj.

## LA PSIKOLOGIO ENDANĜERIGIS LA LEGOKAPABLON

Tiu ĉi scienca nepripensaĵo ne estas la sola obstaklo per kiu la psikologio endanĝerigis la pluvivon de Esperanto. La dua ŝtonego, kiun la psikologio metis en la vojon de Esperanto, temas pri eĉ pli tragika afero. El inter la tutaro de ekipaĵoj kiujn la infano bezonas por sia estonta vivo, la legokapablo sendube estas unu el la plej gravaj. Tiu ĉi aserto estas

<sup>3</sup> Blatt, B: "Lessons from history," *Journal of Learning Disabilities*, vol. 18(1), 1985, 18.

bazita sur la memevidenta fakto ke, se la infano lernas legi, li poste povas legi por plu lerni. El tiu ĉi konstato devenas logika konkludo: se infano malbone legus, li ankaŭ malbone lernus.

Malfeliĉe, en la nuna tempo, nesufiĉa legokapablo, kaj tial ankaŭ nekontentiga lernokapablo, estas jam kruda kaj ĉiutaga realaĵo por timige granda nombro de homoj ĉie en la mondo. En Usono, ekzemple, la "National Adult Literacy Survey" de 1993 — kiu kostis ne malpli ol 14 milionojn da dolaroj — konstatis, ke 96 % el la plenkreskuloj partoprenintaj tiun sondadon, ne sufiĉe bone legis, skribis kaj kalkulis por esti akcepteblaj al kolegio aŭ universitato. Eĉ pli grave estas, ke 25 % el tiuj plenkreskuloj tute ne kapablis legi. Plej grave — kaj plej maltrankvilige — estas, tamen, ke tio okazis malgraŭ la fakto, ke ĉiuj prienketitoj en tiu ĉi sondado ja trairis la normalajn mezlernejajn jarojn. La situacio en la plejmulto de aliaj landoj estas simila.

Pripensiga fakto estas, tamen, ke la situacio rilate la legadon kaj la legokapablon antaŭe estis multe pli bona. Por ebligi komparon, mi denove citas statistikon el Usono. En 1935, prisionado inter 375 000 viroj, kiuj laboris en la "Civilian Conservation Corps" — registarpatronita laborprojekto por provizi dungadon — trovis analfabetecon de nur 1,9 procento — kaj tio estis inter viroj plejparte el malaltaj soci-ekonomiaj tavoloj de la popolo.

Ekde tiu tempo — la tridekaj jaroj de la antaŭa jarcento — legoproblemoj, kaj ankaŭ tuta aro de aliaj tipoj de infanproblemoj, laŭgrade plivastiĝis kaj plimultiĝis tra la tuta mondo. La tuja kaj logika demando estas, kio okazis, ke tiom da infanoj fariĝis la viktimoj de tiaj zorgigaj problemoj? Problemoj pri la legado, literumado, skribado, koncentriĝo, kaj tiel plu — ĉiuj problemoj kiuj antaŭ unu jarcento apenaŭ troviĝis inter la membroj de la lerneja populacio — subite fariĝis preskaŭaj banalaĵoj.

La plej vaste akceptita opinio de psikologoj, psikiatroj, neŭrologoj, pediatroj kaj aliaj tiaj profesiuloj kiuj sin okupas pri tiuj problemoj estas, ke temas pri laŭdira "lernodifektaĵo." Tio implicas, ke la cerbo de la koncerna persono estas iel misfunkcia. Ekzistas, tamen, neniam interkonsento pri tio precize kio tiu misfunkcio ja estas. Cetere, neniam



konfirmo iam troviĝis por subteni tiun ideon de cerba misfunkcio. Oni ĝis nun ne sukcesis malkovri ĝian ekziston pere de iu ajn diagnoza instrumento aŭ metodo. Nur el aro da kondukataj simptomoj oni konkludis, ke ekzistas tia misfunkcio. El tio oni devas konkludi, ke jam dum jardekoj ĝi estas kaj restas nura supozo. Tio indikas, ke la populara ideo pri tiuj infanproblemoj estas science tute senbazaj. Ili baziĝas sur nuraj supozoj, kiuj siavice ankaŭ baziĝas sur aliaj nuraj supozoj. La supozo pri cerba misfunkcio jam ree kaj ree pruviĝis esti nekonfirmebla. Eĉ pli grave estas, ke ĉiuj kaj ĉiuj teraciaj klopodoj surbazaj de tiu supozo por helpi al la “lernodifektitaj” infanoj, havas malgrandan aŭ nenan efikon. Ĉio estas nekonfirmebla kaj nenio efikas. Tute certe tio ne povas esti scienco.

En la intertempo, pli kaj pli da infanoj havas pli kaj pli da problemoj. Precipe la legokapablo daŭre malkreskas. Por Esperanto, la tragedia fakto estas, ke ĉiu infano, kiu ne sukcesas primajstri la legadon, kaj tial ankaŭ ĝenerale malfacile kaj malbone lernas, estas perdita por la afero de Esperanto. Tio signifas, ke por esperantistoj estas tre grave eltrovi la veran kaŭzon de tiu onidira “lernodifektaĵo.”

En la pasinteco, la scio kaj sperto kiujn oni bezonas por eduki infanojn, transdoniĝis de unu familio al alia kaj de unu komunumo al alia tra la generacioj. Rezulte, rekoneblaj tradicioj de infaneduko videblas ĉie ajn kaj ĉiam ajn tra la tuta historio. Tiuj tradicioj baziĝis sur la gepatra sperto pri la edukado de infanoj tra multaj jarcentoj. Dum la lastaj jardekoj, tamen, okazis interrompo de tiuj tradicioj.

En 1898 Edward Lee Thorndike enposteniĝis ĉe la Departemento de Psikologio de la Universitato de Columbia en New York. Thorndike faris multajn eksperimentojn en kiuj li studis la konduton de kokoj, katoj, ratoj, hundoj, kaj tiel plu. Kompreneble, oni ne povas havi ian kontraŭdiron pri tiaj eksperimentoj, kondiĉe, ke la celo estas lerni pli pri tiuj bestoj. Tamen, la celo de la eksperimentoj de Thorndike estis ekscii pli pri la lernado de infanoj. Thorndike estis evoluisto, kaj sekve vidis nur kvantajn sed ne kvalitajn diferencojn inter homoj kaj bestoj. Tial, laŭ li, la bestaj eksperimentoj estis tute valida metodo ekscii pli pri infanoj.

Kiel *edukon psikologion*, Thorndike kaj liaj multaj adeptoj komencis propagandi tiun bestan psikologion al gepatroj kaj instruistoj. Malrapide,

la “scio” kiu akumuliĝis per tiuj bestaj eksperimentoj anstataŭiĝis la tradiciojn kiujn edukistoj — gepatroj kaj instruistoj — antaŭe tiel sukcese sekvis. Tiamaniere, novaj metodoj de edukado, novaj instruaj strategioj kaj novaj klasĉambraj praktikoj ekestis. Bedaŭrinde, tiuj novaj metodoj, strategioj kaj praktikoj katastrofe malsukcesis, pro la simpla — kaj evidenta — kialo, ke infano ne estas koko, aŭ rato, aŭ kato, aŭ hundo, aŭ simio, aŭ ia ajn alia speco de besto, sed infano.

Anstataŭ konfesi, ke la teorioj bazitaj sur bestaj eksperimentoj havas nenan praktikan valoron, la ideo de “cerba misfunkcio” inventiĝis por provi forklarigi la rezultajn lernomalsukcesojn kaj la kondukatajn problemojn. Pli kaj pli da infanoj “diagnoziĝis” kun pli kaj pli neverŝajnaj kaj mitaj misfunkcioj.

Mi jam indikis, ke estas ege neverŝajne, ke infano, kiu malfacile lernas, iam sentus la emon lerni Esperanton. La nombro de infanoj, kiuj suferas je tielnomataj “lernodifektaĵoj” daŭre kaj ŝajne senturniĝe plialtiĝas ĉie en la mondo. Por la afero de Esperanto, tiaj infanoj estas nesaveble perditaj.

Esperanto havas multajn amikojn, sed bedaŭrinde ankaŭ multajn malamikojn. Inter la lastaj sin trovas la moderna psikologio kaj psikiatrio, kiuj pere de tute malsciencaj — sensencaj eble estus pli bona vorto — ideoj jam forrabis de miloj da infanoj la eblecon de normala vivo. Mi ne dubas, ke ili samtempe ankaŭ prirabis Esperanton de multaj eblaj adeptoj.

## *El la landoj kaj sekcioj...*

### **Albanio**

#### **Du novaj E-kursoj**

Du novaj E-kursoj komenciĝis en februaro: unu en Tirane ĉe ties blindulejo kun 7 gelernantoj 13-15 jaraĝaj kaj unu en urbo de Vlora kun 4 gelernantoj 16 jaraĝaj (gvidataj de Bardhyl Selimi kaj Martha Otto). Oni planas starigi novajn kursojn en urbo de Kukes gvidota de Nehat Sokoli, en Pogradec gvidota de Gjergji Gusho kaj en Shkoder gvidota de Saimir Beqiraj.

*Bardhyl Selimi*



## Aŭstralio

### 19-a Aŭstria Somerkursaro de Esperanto, 5-17/01/03

Bonege funkciinta, la plej grava evento de Esperanto en Aŭstralio altiris al 'Mirinda Melburno' preskaŭ 80 personojn por lerni, gvidi kaj ĝui la atmosferon de Esperantujo. La vetero benis nin per sunbrilo kaj agrabla somera temperaturo, perfekta por la ekskursoj al la ormineja urbo Ballarat kaj per pramŝipeto al apuda historia velŝiphaveneto, Williamstown.

La gelernantoj estis dorlotitaj per la profesia instruado de *Grazina Opulskiene* (Litovujo), *Atilio Orellana Rojas* (Nederlando), *Vladka Chvatalova* (Ĉeĥio), *Franciska Toubale* kaj *Marcel Leereveld* (Aŭstralio). Por la unua foje ni fieras ankaŭ pro infangrupo profesie gvidata ĉiumatene de *Penny Vos*.



Surfote: La grupo je la plej alta nivelo instruata de *Atilio Orellana Rojas*: de maldekstre *Bob Felby*, *Matthew Maguire* (la nova prezidanto de AEA) *Bradley MacDonald* (prezidanto de NZEA) *Jennifer Bishop* (vicprezidanto de AEA) *Dave Dewar*, *Alan Mendelawitz*, *Daphne Lawless*, *Paul Desailly*, *Bernie Heinze*, *Hazel Green*, *Sandor Horvath*.

Ni okazigis ankaŭ la Ĝeneralan Jarkunvenon de AEA, jen la nova estraro:  
*Prezidanto, s-ro Matthew Maguire, maguirem@optushome.com.au*  
*Vicprezidanto, s-ino Jennifer Bishop, eksteraj rilatoj,*  
*Vicprezidanto, s-ro Terry Manley, internaj rilatoj*  
*Sekretario: s-ro Ĝono Gallagher, abcetc@ozemail.com*  
*Helpsekretariino: s-ino Hazel Green, hazgreen.@tmba.design.net.au*  
*Kasisto: s-ro Steve Pitney. Help-kasisto: s-ro Ken Rolls*

Dum la kunveno anoncatis honorigoj por AEA-membroj: dumviva membro de AEA, *Trevor Steele*, Ĝenerala Direktoro de UEA kaj novaj Fratuloj de AEA pro ilia kontribuo al la antaŭigo de Esperanto en Aŭstralio, por 2001 s-ino *Jennifer Bishop* kaj Prof. *Ron Gates* kaj por 2002 s-ro *Marcel Leereveld*. La Torr Medaljonon por la instruisto kiu instruis al la plej multaj novaj gelernantoj dum la lastaj 2 jaroj gajnis s-ino *Penny Vos*.

Dum antaŭlasta vespero, la provincaj ŝtatoj konkurencis por gajni la trofeojn por dramo kaj por kantado kaj lastan vesperon ĉiuj festis per bankedo, per disdonado de atestiloj al la studentaro kaj per dankesprimoj al la instruistoj kaj la organizantoj.

*Jennifer Bishop, <esperanto@Education.monash.edu.au>*

## Brazilo

### Nova ILEI-sekciestro

[*La LAMPIRO N-ro 105* intervjuis la novan sekciestron de ILEI en Brazilo, s-ron *Marcos Zlów Zlotovich*. La unua ILEI-kunsido sub lia estreco okazis meze de oktobro 2002 en San-Paŭlo, en la sidejo de KSUL (Kultura Societo Universala Lingvo). Jene ni citas kelkajn alineojn el la plurpaĝa, interesa intervjuo – La Red.]

LL – Kiam estiĝis via rilato kun ILEI?

*Zlów* – Jam delonge *Elvira* aligis min al ILEI. Do, de pluraj jaroj mi ĉiam legas IPR-on kaj konatiĝis kun pluraj E-instruistoj. Mi estas instruisto pri sociologio kaj ankaŭ instruanto de E-o, tial la afero ILEI ĉiam montriĝis al mi tre proksima kaj mi ĉiam interesiĝis pri pedagogio kaj instruado, precipe de E-o, kaj mi estas ankaŭ entreprenisto.



LL – Estri porinstruistan sekcion en lando kun kontinentaj dimensioj kiel Brazilo ne estas facila laboro. Kio instigis vin akcepti tiun gravan taskon?

Zlón – Bone, la afero estas ke ĉiam mi estis kritikemulo rilate al la instruado en la universitato kaj en la lando. Do, mi kredas ke mi ne devas esti nur kritikanto, sed ankaŭ kunlaboranto. La dimensio de la lando ne estas grava problemo, ĉar la mondo estas en nia komputilo, kiu alproksimigas ĉion. Sed nun ne ĉiuj havas elektronikan adreson nek povas viziti la paĝaron en la interreto. Tiu situacio ŝanĝiĝos en la venontaj monatoj kaj jaroj. Mi pensas ke ne estas alia ebleco ol interreto por organizi nian movadon, ankaŭ pro financaj kialoj.

LL – Koncerne al la agado de brazila ILEI-sekcio, ĉu estas ĝia intenco fari eksperimenton en San-Paŭlo kaj nur poste apliki la rezultojn al aliaj ŝtatoj?

Zlón – Ne, ne. Ni intencas daŭrigi la kunsidojn en San-Paŭlo ĉiun duan monaton de la jaro kaj jare okazigi unu seminarion. Sed ni intencas apliki niajn rezultojn en ĉiuj lokoj de la lando. Do, pro tio (mi kaj kelkaj kunlaborantoj) estas dum multaj horoj telefonantaj ĉiutage por traserĉi ĉiujn E-instruistojn en la lando, ankaŭ tiujn, kiuj ne plu instruas, sed antaŭe instruis, por ke ni diskutu kaj organizu nian laboron naciskale.

LL – Aliĝo de E-instruistoj al ILEI estas grava afero. Kiel vi intencas varbi ilin?

Zlón – Bone. Multaj personoj diras ke la problemo de E-Asocio de San-Paŭlo estas la alta kotizo. La problemo ne estas tiu, sed ni ne povas postuli pli ol ni liveras. Do, ankaŭ en BEL. Pro tio mi konsentas kun d-ro Osvaldo, antaŭa prezidanto de BEL, kiam li decidis malaltigi la kotizon, ĉar se ni postulas multon kaj liveras malmulton, okazas la seninteresiĝo de la personoj. Do, ni devas esti koheraj pri tiu afero. Do, la aliĝo al ILEI devas sekvi tiun ĉi vojon.

Ni ne devas fari nur propagandon de aliĝo al ILEI, sen ke ni faru ion pli. ILEI nuntempe liveras IPR-on kaj ankaŭ la revuon *Juna amiko*, por la junuloj. Tiu legmaterialo, do, estas tre konvena. Sed ĉiuj, kiuj aliĝas al BEL, laŭ mia scio, daŭre ricevas *Juna amiko*, do, aliĝi al ILEI nur por

kvar malgrandaj IPR-oj<sup>4</sup> jare povas esti seninterese, se ni ne engaĝiĝas al la iniciato de la instruistaro. Do, mi intencas propagandi kaj kreskigi, multoblige la membraron de ILEI en Brazilo, sed kondiĉe ke kun kongrua ago, de nia Sekcio, kaj kun nia laboro. Nur fari propagandon, ne. Ni laboros por la instruistoj kaj sekve, se ni sukcesos, ni sugestos ke ili kontribuu per la kotizo.

LL – Kiu estas la graveco de Edukado.net por ILEI kaj speciale por la brazila ILEI-sekcio?

Zlón – Mi pensas, ke Edukado.net alportas modernan materialon. Ĝi povas helpi multajn, do, ni intencas ĉeesti ĝin kaj sekvi nian vojon kaj laboron, laŭ la statuto de ILEI, laŭ niaj celoj kaj tiel kontribui ankaŭ por Edukado.net laŭ nia eblo.

## Ĉinio

### E-Movado en Hefei Industria Universitato

Komence de la okdekaj jaroj en la pasinta jarcento ekvigliĝis E-agado en Hefei Industria Universitato. Unue oni fondis E-kursojn por instruistoj kaj laboristoj, kiuj estis instruantaj aŭ laborantaj en la universitato. Poste oni starigis E-Asocion en la universitato.

Ekde la jaro 1985-a la universitato decidis ekfunkciigi ĉiujarajn, nedevigajn E-kursojn por studentoj. Ĉiufoje nia kurso konsistas el 96-128 lernohoroj kaj ĝi donas 5-8 studpoentojn. Nia E-kurso ekzistas jam preskaŭ 20 jarojn longe.

En la lernojaro 2002-2003 la universitato funkciigas nur tri lingvajn kursojn kaj E-kurso estas unu el ili. La aliaj du kursoj estas la germana kaj japana.

En la universitato estas multaj montrofenestroj, kaj la E-montrofenestro okupas la komencan lokon. Oni povas akiri informojn tie pri Esperanto. Nia universitato daŭrigos la E-kurson en venontaj jaroj.

Liu Baoguo, <liubaoguo@ah163.com>

<sup>4</sup> Estas vere danĝera (por ambaŭ flankoj) tiu ĉi misinformo. BEL-anoj ne plu ricevas la revuon JA senpage (vidu la artikolon de Stefan MacGill en tiu ĉi IPR-numero)! Krome mi publike demandas mian sekciestron kolegon, kion precize signifas por li la esprimo „kvar malgrandaj IPR-oj”? ☺... La Red.



## Finlando

### E-kursoj en Popola Instituto de Valamo 2003

La kurso okazos inter la 14-a kaj 18-a de julio 2003 en Valamo, Heinävesi (orienta Finnlando) en ĉiuj lingvonivelejoj. Krom la ĉiutaga 5-hora lernado okazos diversaj kulturaj aktivecoj. Instruistoj: *Atilio Orellana Rojas, Carola Antskog, Tiina Oittinen*.

Detalojn petu de: *Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, Finnlando, <sekretario@esperanto.fi>* aŭ de *Carola Antskog* sekciestro de ILEI (adreso sur K4).

*laŭ informoj de Vekilo No 1, 2003.02.20*

## Francio

### Ekspozicio de infan-desegnaĵoj en Angers

En 2004 la E-centro de Angers festos la centjariĝon de la loka E-movado. Je tiu okazo antaŭvideblas diversaj manifestacioj, i.a. ankaŭ internacia ekspozicio de infan-desegnaĵoj pri la ĝenerala temo de la "daŭra disvolviĝo" (t.e. protektado de naturo, arbaroj, bestoj, lukto kontraŭ polucio, suna energio, pli sanaj homoj, agrikulturo, pura akvo ktp.) La plej belaj desegnaĵoj estos premiitaj kaj ekspoziciitaj. Aĝokategorioj: ĝis 7, de 7 ĝis 10, de 10 ĝis 14. Adreso: *E-centro, André Frangeul, 6, rue du Buis, FR-49000 Angers, Francio. <bertrand-gilet@wanadoo.fr>*

## Staĝoj en Grezijono

La kultura domo de Esperanto en la kastelo Grezijono (apud Angers) malfermos siajn pordojn ĉi tiun someron kaj proponos diversgradajn staĝojn (28/06 ĝis 30/08). Informoj: *Tel/fakso: +33 (0)2 41 89 10 34, reto: <grezijono.kastelo@free.fr>, http://grezijono.kastelo.free.fr*

*Informis: <armelle.tata@netcourrier.com>*

## Germanio

### Esperanta Kurs-centro fondita

Laŭ la informoj de *Esperanto aktuell 2003/2* en la urbo Herzberg – kun la aprobo de GEA – oni fondis centron por la pluklerigado de E-funkciuloj, kursgvidantoj, instruistoj. La antaŭkondiĉo por partopreni la kursojn estas la bona scio de E-o, kaj laŭeble la scio de pliaj fremdlingvoj. La klerigado havos tri ŝtupojn: kursoj por funkciuloj, E-kursgvidantoj, E-instruistoj. Respondeculo de la centro estas *Peter Zilvar*.

Esperanto-Gesellschaft Südharz okazigos inter la 6-a kaj la 10-a de junio 2003 **C-Seminarion pri Cseh-metodo** kaj diplomigan ekzamenon en la urbo Herberg/Harz (Germanio). Ĉi tiu seminario estas la lasta etapo en la edukado por fariĝi instruisto de Esperanto specialigita en la uzo de la rekta metodo. Pliaj informoj pri la programo, kotizo, loĝeblecoj, ktp., estas riceveblaj ĉe: *Esperanto-Gesellschaft-Südharz, Grubenhagenstr 8, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio; telefono +49 5521 1363 kaj rete pere de <zilvar@t-online.de>*

## Hungario

### 18-a Landa Pedagogia Tago (1-a de marto 2003)

La eventon organizis la hungara sekcio de ILEI kun la gvido de Kovács Márta (ĉeforganizanto), Tötösné Gados Zsuzsa, Molnár Mónika, Salomonné Csiszár Pálma kaj Németh József. Ĉeftemo estis: *instruado de progresintoj*. Pli ol 50 partoprenantoj povis ĝui la modellecionojn de Barossné Kóródy Zsófia, Felszeghy Judit, Tötösné Gados Zsuzsa, Ködmön Károlyné kaj Soós Károly.




Surfote: *Hungaraj aktivuloj dum PT (de maldekstre): d-ro Blazio Vaha (lingvisto), d-ro Petro Murányi (altlernejo BDTF), Farkasné Tatár Éva (eksredaktorino de hungara E-radio), Ivan Bujdosó (E-fako de ELTE).*



Post la modellecionoj la hungara sekcio de ILEI havis sian asembleon. Ni decidis grave altiĝi nian membrokoton. Ni prezentis al la publiko du lumdiskojn eldonitajn de nia sekcio kun la prelegoj de István Szerdahelyi. La lumdiskojn ni kompilis uzante la sonregistraĵojn de nia karmemora kolegino, Zsuzsa Barcsay. (Por akiri la diskojn kontaktu la hungaran sekcion de ILEI.)

Fine de la tago Oszkár Princz prelegis pri la ŝtataj E-lingvoekzamenoj. Li traktis la sekvajn punktojn: datoj kaj aliĝdatoj de la ekzamenoj, taskoj de la skriba ekzameno, tipaj eraroj, misaj tradukoj, malĝusta vortfarado, ktp., taskoj kaj temaro de la parola ekzameno, kaj fine la sistemo de taksado de la ekzamenoj. Li disdonis kajeron kiu koncize enhavas ĉiun informon pri la ŝtata ekzameno, inter aliaj la tipajn erarojn, la pritaksan sistemon de la ekzamena entrepreno ITK (Perfektiga Centro Fremdlingva), la temaron en la meznivela ekzameno kaj la rekomenditajn instruilojn.

*József Németh, sekciestro, <jozefo@nl-papa.hu>*



*Teatraĵo de E-Federacio de Viktorio - La Bestokuracisto, Dorothy Bysouth (kliento kun kato) Alan Bishop (kliento kun hundo), Franciska Toubale (kliento kun pulo) dum la 19a Aŭstralia Somerkursaro*

## Litovio

### Kurso en Kaunas E-domo

Litova E-Asocio kutimas organizi E-kurson kelkfoje ĉiujare. La 24-an de februaro komenciĝis unumonata intensa kurso por komencantoj kaj daŭriga kurso por tiuj, kiuj faris kurson por komencantoj en 2002. Enskribiĝis 35 komencantoj. La daŭrigan kurson partoprenas 30 personoj. La kursojn gvidas fama instruistino de IEI, sinjorino Ewa Bondar.

*Aida Cizikaite, Sekretariino de LitEA, <litova.ea@mail.lt>*

## Nederlando

### Jarkunsido de la nederlanda ILEI-sekcio

La 29-an de marto NGGE okazigis sian Jarkunsidon. Dum tiaj kunsidoj kunvenas la membraro de la organizo por diskuti pri administraj aferoj rilate al NGGE kaj kion entrepreni en la periodo de 1 jaro.

Inter la decidoj estis la okazigo ankaŭ ĉi-jare de la tradicia Studotago, ĉi-foje la 4-an de oktobro kun enhavoriĉa programo kalkulanta interalie pri la vizito de la Ĝenerala Direktoro de UEA, *Trevor Steele*. Pliaj eroj de la kunsido estis la decido pri lanĉo de nova varbilo por NGGE, ĉar estas forta deziro en la organizo altiri pli da instruistoj; estis reorganizata la redaktora laboro de la bulteno "NGGE Sciigas"; estis pripensata serio da proponoj al ILEI prezentotaj kadre de la ĉi-jara ILEI-Konferenco. Estis ankaŭ analizata la rilatoj kun la Kuba ILEI-Sekcio, kun kiu NGGE havas kunlaborajn rilatojn ekde la jaro 2001.

*Atilio Orellana Rojas, <iei001@tiscali.nl>*

## Pollando

### Internacia Pedagogia Kurso en Bydgoszcz

Preskaŭ 100 gestudentoj el Eŭropo, Afriko kaj Azio partoprenis la Internacian Pedagogian Kurson, kiu okazis en ISTK-AIS klerigejo en Bydgoszcz, Pollando (31.01-9.02.2003). Okazis interalie kursoj de Esperanto kaj hispana lingvoj gvidataj de Augusto Casquero de la Cruz, Cseh-seminarioj sub gvido de Ewa Bondar, kurso pri planado de karieroj - de Romeo Grzebowski kaj pluraj kursoj pri didaktiko, pedagogio, psikologio kaj sociologio, kiujn gvidis profesoroj de Bydgoszcz-a Akademio kaj de Vojevodio Centro de Edukado de Instruistoj.

Nun la gestudentoj prepariĝas al internacia kurso por E-vojaĝgvidantoj kaj 23 Pola AIS-sesio en Bydgoszcz dum 26 aprilo - 4 majo 2003.



Tiuj, kiuj sukcese ĉeestos la kurson kaj studadsesion en Bydgoszcz, povos daŭrigi la studadon ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj por bakalaŭriĝi aŭ poste magistriĝi ĉe AIS.

*Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo,  
str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando  
Augusto Casquero de la Cruz, <augustocasquero@hotmail.com>*

### **Gejunuloj el Pollando kaj Afriko kune lernas Esperanton**

Mi invitis al mia grupo de komencantoj en Jagelona Universitato gejunulojn el Siera-Leono, Angolo kaj Tanzanio studentajn en Krakovo. (Invitilon al la interkultura grupo ricevis pli ol 20 gestudentoj el 10 landoj de meza kaj suda Afriko. Tamen plej efika montriĝas ĉiam persona invito.)

Ilia ĉeesto provizas naturmaniere temojn por interkulturaj interŝanĝoj. La enhavo de la lecionoj kutime estas pli interesa ol artefaritaj lernolibraj tekstoj. Tiel la studentoj mem liveras la enhavon de la lecionoj. La laboro estas interaktiva: konsistigas ĝin ne nur prezentado, sed ankaŭ aktiva akirado de scioj pere de demandoj farataj al la kunstudentoj. La instruisto helpas kaj kompletige alportas gramatikan kaj leksikan-sintaksan materialon.

Krom la akiro de scioj aperas ankaŭ alia utilo: dum la lecionoj ĉiuj lernantoj ekzercas la kapablon paroli pri siaj urbo, lando, ties loĝantoj, kulturo ktp., kaj prezenti ilin al aliaj homoj. Ja ĉiu esperantisto estas potenciala ambasadoro de sia lando.

Esperanto en Jagelona Universitato estas instruata de 1908. Kelkaj studentoj interesiĝas pri posta studado en la E-fako de Poznan.

*Maria Majerczak, sekciestro*

### **Pli proksimen al la mondo!**

"Blizej Swiata" estas fremdlingva artkonkurso por gelernantoj de elementaj lernejoj kaj gimnazioj el la vojevodio Malopolska. Ĝi okazas unufoje jare en Elementa Lernejo n-ro 68 en Krakovo. Jam ekde tri jaroj Esperanto estas en ĝi reprezentata, sed nur de 2002 oficiale. La partoprenantaj infanoj ne nepre devas lerni Esperanton lerneje aŭ scii ĝin, sufiĉas, se ili scipovas prezenti en tiu lingvo poemojn, kantojn aŭ aliajn, laŭ sia elekto.

La gajninta gimnaziano en 2002 ricevis kromajn 10 poentojn en enirkonkurso al bona liceo kiun ŝi elektis (kun 10 kandidatoj je unu disponebla loko!), kaj estis akceptita.

*Laŭ la informoj de "Ligilo", novaĵletero de Pola ILEI-Sekcio*

## **Rumanio**

### **Novaj lerniloj**

Post la apero, en septembro 2002, de "Poŝvortaro Esperanta-rumana kaj rumana-Esperanta" (252p., Cluj-Napoca: Dacia), en februaro ĉi-jara aperis "Esperanto - manual de limba internat@ionala~" - la lernolibro de la zagreba metodo, adaptita por rumanlingvanoj (64p., Cluj-Napoca: Grinta). Pretigataj estas la baldaŭ aperonta vortlisto por rumanlingvanoj por la populara instruromaneto "Gerda malaperis!" (28p.) kaj nova lernolibro verkata de bukareŝtaj esperantistoj.

*Ionel Onet, <ionel@co.uea.org>*

## **Rusio**

### **12 novaj E-instruistoj trejniĝis**

12 personoj el kvin urboj (Ĉeboksary, Novoĉeboksarsk, Tjumen, Niĵnij Novgorod, Ivanovo) trejniĝis la 22-24 de februaro en Ĉeboksary pri E-instruado. La seminarion gvidis mi. Mi prezentis mian instru-metodon, nomatan "lud-metodo". Ĉio pasis sufiĉe vigle kaj streĉe. La novaj E-instruistoj lernis ne nur konkretajn spertojn kaj pretajn ekzercojn, sed ankaŭ konstante estis petataj mem krei novajn. Tiuj nove elpensitaj trovaĵoj estis tuj provataj de la ceteraj partoprenantoj - kaj plejparte evidentiĝis sukcesaj.

La aranĝo estis preparita kaj gastigita de la Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko.

*Andrej Grigorjevskij, <andreo@esperanto.msx.ru>*

## **Svedio**

### **E-o en la Universitato de Stokholmo**

Ekde aŭtuno 2003 eblis studi E-on en la Universitato de Stokholmo. La unuaj du partoj okazos en la aŭtuna, la 3-a kaj 4-a partoj dum la printempa semestroj. La celoj de la porkomencanta kurso: doni bazajn sciojn pri E-o, kaj kapablon uzi ĝin skribe kaj buŝe. Krome oni konatiĝos kun interpopola komunikado kaj planlingvoj. Svedlingvajn detalojn petu de Sylvia Hämäläinen, <veli.hamalainen@kolumbus.fi>.



**Derek Roff:**

## **Muzika sidado - Grupa interkoniga ludo**

Tiu ludo funkcias kun partoprenantoj de ĉiuj lingvo-niveletoj. Ĝi estas variaĵo de ludo, kiun oni nomas en Usono "Muzikaj Seĝoj". Nia ludo havas du gravajn avantaĝojn por interkonaj celoj: ĉiuj restas en la ludo ĝis la fino, kaj la ludantoj kunlaboras anstataŭ konkurenci. La ludo povas esti iom vigla, kun iom da interhoma kontakto. Do, juĝu ĉu ĝi taŭgas por la homoj en via grupo. Tamen, ne supozu ke ĝi funkcias nur kun junuloj. Eble ĉar ludantoj agas tute ekster la sociaj normoj de ĉiuj kulturoj, plej diversaj homoj pretas provi kaj ĝui ĝin.

Necesas seĝo por ĉiu ludanto kaj muzikilo (aŭ kantema gvidanto).

**Aranĝu** la homojn en maldensa cirklo de seĝoj. Klarigu al la ludantoj, ke kiam vi aŭdigas la muzikon, ili ekmarŝu en cirklo (interne de la cirklo de seĝoj). Kiam vi haltigos la muzikon, ĉiuj rapide trovu seĝon, kaj sidu per ŝerce formala pozo. La persono kiu laste sukcesos sidi, kaj digne silenti, devas prezenti sin: "*Mi nomiĝas Derek.*" La kutima honto esti "la LASTA" tiel fariĝas ia honoro, ĉar nur tiu persono prezentas sin. Poste, vi re-aŭdigas la muzikon, kaj la ludo ripetiĝas.

Tio rapide fariĝas teda, se vi ne ŝanĝus ion.

Do, **ekde la dua fojo**, dum la muziko sonas, komencu puŝi iujn seĝojn al novaj pozicioj, tiel ke la seĝa cirklo fariĝas iom serpentuma kaj ĥaosa. Pro tio, trovi seĝon kiam la muziko haltos ne estos tute facile kaj regule. Tamen, tio ne sufiĉos por longe reteni la intereson. Juĝu laŭ la energio de



la grupo, kaj **post tri aŭ kvar fojoj**, kiam ĉiuj komprenas la bazan formon, anoncu ke en la sekva ciklo, vi forprenos seĝon.

Tamen, tio NE signifas ke iu ne sidos. Male, la LASTA persono devos sidi sur iun, kiu jam trovis seĝon. (Interesa elekto... sur kiun mi eksidu?) Emfazu ke ili estu ĝentilaj. (Kompreneble, oni ne suferigu la kunseĝulon. Restigu la piedojn sur la planko, kaj klinsidu, anstataŭ meti la tutan pezon sur la alian personon. Kutime, mi montras ĉion-ĉi al la grupo, antaŭ ol ili faras).

La LASTA persono (por kiu ne restis propra seĝo) petu permeson antaŭ ol sidi sur iun: "*Ĉu mi rajtas?*"

Al la peto, la sidanto respondu, "*jes,*" "*ne,*" aŭ "*ni interŝanĝu.*"

- Je jesa respondo, la LASTA eksidas kaj sin prezentas.
- Post respondo "ne," la LASTA petos al alia persono, ĝis iu akceptos.
- Al respondo "ni interŝanĝu," la sidanto ekstaras, la LASTA eksidas sur la seĝon, kaj la sidinto eksidas sur la LASTAn. Tiu prezentas sin, kaj poste aldonas prezenton de la kunulo: "*Mi estas Derek, kaj mi sidas sur Marta.*"

Denove aŭdigu la muzikon, deprenu plian seĝon, kaj movu kelkajn aliajn. Je la fino de la muziko, ĉi-foje du homoj devas sidi sur iun. Kutime, vi havos du parojn, sed se ili deziras, ili rajtas sidi tri sur unu seĝo. Nun pli da homoj prezentiĝas: "*Mi estas Lana, kaj mi sidas sur Adriana.*" Kaj de alia seĝo, "*Mi estas Viktor, kaj mi sidas sur Johano.*" Ripetu.

Ekde tiu fazo, malofte la ludantoj enuiĝas. Ludu ĝis minimume, ĉiu sidas sur aŭ sub iu. En granda grupo, deprenu pli ol unu seĝon dum ĉiu ciklo. Kiam pli ol du sidas sur unu seĝo, la prezentoj estu en tia formo:

"*Mi nomiĝas Klara, kaj mi sidas sur Steĉjo.*"

"*Mi estas Steĉjo, kaj mi sidas sur Martina.*"

"*Mi estas Martina, kaj mi sidas sur Karlo.*"

"*Mi estas Karlo, kaj vi tri estas pezaj.*" ktp.

Do, ĉiu persono prezentas sin, kaj unu alian personon en la staplo. Post nelonge, ĉiuj prezentiĝos plurfaje.



Daŭrigu laŭ via takso de la etoso. Kun malgranda grupo, eble vi ludos ĝis restas nur unu seĝo. Kun granda grupo, vi eble haltos kiam pluraj seĝoj restas (ĉiu kun aro de sidantoj).

Mi ŝatas **fini la ludon en kompleta cirklo**. Mi petas ĉiujn stari kun mi en cirklo, kiel ni komencis la ludon, pretaj por ekmarŝi. Poste, mi petas ĉiujn, "Metu la du manojn sur la ŝultrojn de la persono antaŭ vi." Sekve, mi petas ke la homoj proksimiĝu kaj la cirklo malgrandiĝu, ĝis la distanco inter ĉies brusto kaj la dorso antaŭ ili estas ĉ.20 cm (manoj restas sur la ŝultroj).

"Nun," mi diras, "Ĉiuj, tre malrapide, zorge kaj atente, eksidu sur la personon, kiu estas malantaŭ vi." Post kiam ni atingas komfortan cirklan sursidadon, mi sugestas ke delikata masaĝado de la ŝultroj eble plaĉus al via antaŭulo, "Demandu kaj faru, se vi interkonsentas." Dum la masaĝado, mi komencas sinprezentadon, kiu daŭras tra la tuta cirklo: "Mi estas Derek, kaj mi sidas sur Johano." "Mi estas Johano, kaj mi sidas sur Katarina." Ktp, ktp, ĝis ĉiuj prezentis sin kaj sian "seĝulon."

Mi finas per ia ĉarme-stulta diraĵo, kia :

*Tia estas Esperanto, ĉu ne? Ĉiuj subtenas la aliajn.*

Mi direktas ĉiujn zorge restariĝi, kaj la ludo finiĝas.

\*\*\*

**Notoj:**

- Foje, du aŭ tri homoj ne deziros ludi. Kutime, mi petas ilin helpi al mi per funkciigo de la muzikilo, depreno kaj rearanĝo de la seĝoj. Ofte, post kiam ili observas kelkajn ciklojn, forvelkas la hezitemo, kaj ili pretas partopreni. Avantaĝo de tiu ludo estas ke iuj povas eniri (aŭ eliri) la ludon meze, sen ĝeni la ludadon.
- La persona, ofte eĉ korpa kontakto eble ne plaĉas al ĉiu, tio povas dependi de kulturoj kaj aĝo. Bv. konsideri kaj respekti tiun faktoron.
- Estu atenta al la grupo kaj individuoj, kaj interveni kiam necesas por glatigi ĉion.

*Fonto: < <http://www.edukado.net> >*

**Por via notlibro...**

## **a) Nova fondaĵo ĉe UEA: EDUKADO**

La estraro de UEA voĉdonis por starigi novan fondaĵon, kies nomo klarigas ties funkcion: EDUKADO. Ĝi estas fondaĵo por kolekti financan subtenon por la kampo de Edukado/Instruado. Ĝis nun la instruado de Esperanto (unu el la prioritatoj de la nun valida labor-plano) estis subtenata esence de ILEI, per sia negranda buĝeto kaj per la helpo, kiun UEA donis ĉiujare al ILEI el sia propra buĝeto.

Nun individuaj esperantistoj, kiuj opinias, ke gravas instruado de Esperanto kaj pli ĝenerale edukado pri Esperanto, havas plian eblecon direkti sian helpon al la ĝusta loko.

Kiel pri aliaj fondaĵoj oni povas indiki ke oni deziras, ke la donaco eniru la Kapitalon Edukado. En tiu kazo nur la rento estos uzata por elspezoj, dum la kapitalo restos por doni renton ankaŭ en postaj jaroj. Nun, kiam ILEI provas lanĉi la duan periodon de la internacia instrua projekto INTERKULTURO, estas evidente, ke helpo (almenaŭ en la formo de lernolibroj por lernantoj en landoj je malforta ekonomia nivelo) estas ege necesa.

Oni povas donaci per la kutimaj kontoj de UEA kun la indiko "por Fondaĵo Edukado" aŭ "por Kapitalo Edukado"

*Renato Corsetti, prezidanto de UEA  
Mauro La Torre, prezidanto de ILEI*

## **b) LERNU.NET sukcesas!**

Ĉe "Lernu!" <<http://www.lernu.net>> oni trovas plurajn retkursojn kaj multajn aliajn helpilojn por informiĝi pri Esperanto kaj lerni ĝin, en diversaj lingvoj. Nun, se oni verkas E-kurson por interreto, oni ne devas fari la tutan laboron de la komenco, sed povas utiligi la ilojn de "Lernu!": traduk-sistemo, vortaroj, informoj pri Esperanto, ekzemplaj tekstoj kaj sondosieroj, tujmesaĝilo...

Kunlaboremuloj por aldoni novajn lingvojn aŭ iĝi lingvo-helpantoj bonvenas! Skribu al <[teamo@lernu.net](mailto:teamo@lernu.net)>.



### c) Komputilaj ludetoj en Esperanto

Mi kreis en mia TTT-ejo novan rubrikon: ludoj en Esperanto, en kiu estas preskaŭ dudek ludoj, kiujn mi trovis en la reto kaj esperantigis. Ili ĉiuj estas malgrandaj, simplaj, sed diversspecaj kaj ofte vere belaj. Ili utilas por instruado, cerbotrejnadado aŭ almenaŭ por plibonigo de la humoro. Juĝu mem: <<http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html>>.

Estas tre bonvenaj viaj sugestoj, kritikaj rimarkoj, korektoj kaj proponoj.

Mihail Povorin, <[povorin@yandex.ru](mailto:povorin@yandex.ru)>

\*\*\*

## Someraj aranĝoj en Svedio...

### a) Programo de la 36-a Konferenco de ILEI

2-7-a de aŭgusto 2003, Örestrand, Svedio

Horoj	Konferenca programo	IK-seminario
<i>Ĉiutage</i>		
07.00-08.30	Matenmanĝo	
08.30-09.30	Estrarkunsido	
12.30-13.30	Tagmanĝo	
18.00-19.30	Vespermanĝo	
20.00-21.30	Distra programo	
<i>Sabato, 2/8</i>		
16:00	Alveno al konferencejo <sup>5</sup>	
17:00-18:00	Estrarkunsido 1	
20:00-	Interkona vespero	
<i>Dim., 03/08</i>		
10:00-11:00	Malfermo	
11:30-12:30	Lars Forsman: 15-jara E-instruado	Enkonduko al la projekto kaj seminario
14:00-17:00	Komitatkunsido I: raportoj kaj elektoj	Interkultura lernado: kio, kial, kiel

<sup>5</sup> Transporto de Gotenburgo al Örestrand kostas 30 EUR!

<i>Lundo, 04/08</i>	Konferenca programo	IK-seminario
09:30-11:00	Komitatkunsido II.	Kiel aktivigi la partoprenantojn
11:20-12:20	H. Tonkin "La scienca kunteksto de E-instruado"	←
14:00-15:00	Mauro La Torre: Interkulturo: de IK1 al IK2	En komputilejo: Retpaĝaro de Interkulturo (kiel uzi ĝin)
15:30-16:30	Stefan MacGill: Interkultura didaktiko	
16:30-17:50	Interkulturo: Diskuto pri estonta realigado	
21:30-	Kunsido de IK-teamo: konkludoj	
<i>Mardo, 05/08</i>		
09:30-10:30	Ronald Glossop: Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo	Grup-ekzercoj: interklasa kunlaboro
11:00-12:00	Radojica Petrović: Instrukapbligado - diskuto	
14:00-15:00	Hokan Lundberg, Sonja Petrović: Retpaĝaj E-projektoj (E@I – nova partnero de ILEI)	Grup-ekzercoj
15:30-17:30	Komitatkunsido III.	Pritakso, konkludoj
18:00-19:30	Solena vespermanĝo	
<i>Merk., 06/08</i>	Ekskurso ĉirkaŭ Öresund	
<i>Ĵaŭdo, 7/8</i>		
09:40-10:40	Diskuto/taksado	
11:00-12:00	Fermo	
12:30-13:30	Adiaŭa tagmanĝo	

### b) Infanoj el multaj landoj (IIK)

Kiel kutime, okazos paralele kun la Universala Kongreso en Gotenburgo aparta internacia aranĝo por infanoj. Jam aliĝis al la Internacia Infana Kongreseto infanoj el Francio, Hungario, Kubo, Norvegio, Rumanio, kaj Svedio, kun interesiĝoj el Britio, Germanio kaj Japanio. Ni havas kvar gvidantojn, du svedlingvaj, kaj bonvenigas pliajn infanojn. Ili estu inter 6 kaj 13-jaraj kaj kapablu paroli Esperanton. Ĝis la 31a de majo partopreno



kostas 245 eŭrojn (215 por B-landanoj). Tio inkluzivas loĝigon, ĉiujn manĝojn kaj la programon.

La kongreseto okazos en Lerum, 18 km. for de Gotenburgo, en loko nomita Knappekulla. Ni loĝos en lignaj dometoj ĉirkaŭ centra manĝejo kaj kunvenejo. Tuj apude estas freŝakva lago kun sabla fundo kaj tre pura akvo. Estas plie arbaro kun mirteloj, loko por libere ludi kaj futbal-tereno. Promenaj vojetoj preterpasas vilaojn, somerdometojn kaj unu/du farmbienojn kun bestoj.

Riĉa programo estas en preparo. En Borås, 50 km for, troviĝas granda bestoĝardeno kun elefantoj (elefantido ĵus naskiĝis) ĝirafoj, delfenoj, nordaj bestoj k.t.p. Eblas uzi la buson por ekskurso tien. Oni kunportu manĝaĵon kaj sidu en la parko.

Petu aliĝilon kaj anoncu aliĝojn al: *Stefan MacGill, Pannonia u. 30, I, 6, HU-1136 Budapest, Hungario <stefan.macgill@galamb.net>*. Pagojn direktu al la Centra Oficejo de UEA aŭ via enlanda kongresa peranto. Pliajn informojn kaj elpreseblan aliĝilon oni vidas ĉe la hejmpaĝo de UEA, sub "Kongresoj".

### c) Trejnseminario dumkonferenca

- ✓ **Ĉu vi estas Esperanto-instruanto?**
- ✓ **Ĉu vi ŝatas labori kun gejunuloj?**
- ✓ **Ĉu vi relative regule uzas interreton?**
- ✓ **Ĉu vi sentas inspiron por interkultura komunikado kaj lernado?**
- ✓ **Ĉu vi ŝatus mem partopreni kaj helpi al E-lernantoj parto-preni en interkultura interŝanĝo kun grupoj de diversaj partoj de la mondo?**

! *Se jes, eble la Trejnseminario por klasgvidantoj kaj helpantoj en Interkulturo estas io por vi!* ↗

Inter la 2a kaj 8a de aŭgusto 2003, dum ILEI-konferenco en Örestrand, Svedio, okazos **trejnseminario por 10 estontaj grupgvidantoj kaj helpantoj en la projekto Interkulturo**. Restadkostoj estos kovritaj por ĉiuj seminari-partoprenantoj kaj laŭbezone ankaŭ parto de vojaĝkostoj. Dum la seminario oni traktos la sekvajn temojn:

- Kio estas "interkultura lernado"?
- Kion signifas "interkultura edukado"?
- Kio estas rolo de subtenanto en procezo de interkultura lernado kaj kio ĝi ne estas?
- Kiel kaj kial realigi interkulturan lernadon?
- Praktikaj metodoj kaj ekzercoj.
- Ĉio supre menciita, sed per interreto.

La ĉefa celo estas prepari homojn por partopreno en la provfazo de Interkulturo dum aŭtuno 2003, kio signifas ke partoprenantoj de la seminario aŭ mem gvidos Interkulturo-grupojn (kiuj laŭeble jam regetu Esperanton), aŭ pretos agi kiel projekt-helpantoj.

Se vi interesiĝas, simple skribu al [seminario@interkulturo.net](mailto:seminario@interkulturo.net), kaj ni sendos demandaron kaj laŭbezone respondojn viajn demandojn. Limdato por aliĝoj estas la 10a de junio!


Pli da informoj pri la projekto ĝenerale vi trovos ĉe [www.interkulturo.net](http://www.interkulturo.net). En la sama loko baldaŭ aperos seminari-aliĝilo.

*Sonja Petrovic, teamano de Interkulturo*  
<[sonja@ikso.net](mailto:sonja@ikso.net)>

### Memore pri HANS TEN HAGEN (1932 - 2003)

La 14-an de marto forpasis, 71-jara, nia fervora kolego, ĉiam helpema per informoj, konsiloj kaj plenumado de esencaj taskoj. Lia pozitiva sinteno en studado, laborado kaj interŝanĝo de ideoj, aldone al modesteco, vekis ĝeneralan simpatian.

Ekkoninte kelkajn frazojn en E-o de la gepatroj jam en 1938, post la milito (1948) li aliĝis al *JuKo*, la junulara komunumo de laboristaj esperantistoj; fariĝis ĝia sekretario kaj partoprenis la SAT-kongreson en Amsterdamo. Samjare li akiris sian unuan diplomon (A).





Dum trijara civilservo – ĉar li rifuzis soldatservi! – li plustudis (1952 -), ĝis li fondis familion kaj devis sin limigi al korespondado. Kvazaŭ kompanse lian revenon en 1982 markis serio da seriozaj funkcioj.

Kvindekjara li aliĝis al Nederlanda Esperanto-Asocio kaj ĝia sekcio en Alkmaro, kiu en 1985 lin elektis kiel sekretarion kaj dek jarojn poste ankaŭ kiel kasiston. "La Fromaĝokloŝo", aludanta la faman fromaĝ-bazon, sub lia redaktado servis pli ol la lokan klubon. Por la kluba ĥoro "Malvo", en kiu li kaj lia edzino Els kunkantis, li tradukis nederlandajn kantojn. Kun Els li aktivis ankaŭ en la organiza teamo por la kulturaj Faulhaber-semajnfinoj. Kiam NEA kaj la laborista, tiam progresema, FLE kunfandiĝis en "Esperanto Nederland" (1984), jam la postan jaron Hans akceptis ankaŭ ĝian kasistecon, krome administrante la membraron kaj agante en la "Komisiono pri instruado". Ĉe UEA, kies Jarlibroj lin mencias kiel Delegiton por Heerhugowaard ekde 1986, li reprezentis la landan asocion ekde 1996 (Komitatano A). Plue li membris en ĝia Komisiono pri Financoj.

Ekde la Jubilea Jaro (1987) Hans mem instruis, konsekvence aliĝis al NGGE (la landa sekcio de ILEI), kiu volonte uzis liajn kapablojn de kasisto (1991-2002), sekretario kaj redaktoro de NGGE SCIIGAS (de 1993). Por blinda kunestraranino li proprainiciate prizorgis la surkasedigon de la dokumentoj.

Daŭre li subtenis siajn kapablojn per praktikado: ĉe la Haga IEI (Internacia Esperanto-Instituto) li akiris sinsekve ĉiujn Cseh-diplomojn A, B kaj C (1994-1996). Regule li partoprenis UK-ojn (ekde 1985) kaj de 1995 ankaŭ la konferencojn de ILEI. En 1996 li transprenis la rolon de la forpasinta Oene Hoekstra en la Komisiono pri la Statuto; precipe en la konferenco de Montpellier li adaptis la Internan regularon laŭ la Statuto (1998), sed ankaŭ en 2002 li preparis modifon por ebligi pli facilan estrar-elektan ritmon. Samkiel ĉe li kunligiĝis la landa kaj la internacia agado, tiel en la loka nivelo li forte apogis la ĝemelurbajn kontaktojn kun la germana Darmstadt, franca Troyes kaj precipe la hungara Tata. Plej fama iĝis la Turisma Semajno en Alkmaro post la 73-a UK en 1988, kiam Hans insistis pri ĉiutagfina taksado, kio evoluis bone kaj kio malbone, senindulĝe al si kaj siaj, same laciĝintaj kunagantoj. Necesis ja plejeble perfekta organizado. Eĉ multajn jarojn post la evento partoprenintoj elmontris sian grandan aprezon.

En NGGE restas dankaj memoroj pri Hans ten Hagen, kiu eĉ siajn lastajn hejmajn tagojn dediĉis al la financa raporto, kiun li promesis – se eble – pretigi.

Rob Moerbeek

## Pri Juna amiko...

### a) Lastaj vivebloj por nia amiko

*Juna amiko* eniris malfacilaĵojn. Unuavice oni kredus ke tion kaŭzis la perdo de grup-abonoj el Brazilo. Tiujn mendis BEL inter 1998 kaj 2002, kaj sumis laste je 600. Ni ĉiuj bedaŭras ties ĉesigon, sed daŭra fal' de l'real' devigis tion. Tio ja fortranĉas trionon de la eldonkvanto, sed fakte ne multe influas la financan staton de la revuo. Tio suferas ĉefe pro la kontinua falo de plentarifaj abonoj depost ĝia pinto (630) en 1996, kiu abrupte severiĝis en la lastaj du jaroj. Se *Juna amiko* havu estontecon, tiun tendencon ni tuj haltigu kaj resendu supren. En la konferenco julie, la estraro kaj komitato rigardos la abonojn por 2003. Ili atendos vidi 400 plentarifajn abonojn kaj preskaŭ mil entute; tiuj sumoj devigataj plenumi ekvilibran buĝeton. Ĉiam ĝis 2000 la revuo portis al ILEI profiton. En 2001 la deficiton estis ĉ. mil euroj, en 2002 pli ol tri mil – apenaŭ malpli ol la sumaj enspezoj. Tian minuson ILEI ne povas elteni denove.

### b) Kion ni jam faris?

Ni kompilis ekvilibran buĝeton por 2003 kaj laboras plenumi ĝin. Ni starigis por ĉiu lando abon-kvoton kaj aktive mesaĝumas kun perantoj kaj sekcioj. Ni reformis la enhavon (vidu la redaktoran raporton). La eldonkvanton ni tranĉas de 2000 al 1100 kaj eble pli. Ni draste limigos la dissendon de senpagaj numeroj: interŝanĝe al aliaj revuoj, bibliotekoj, oficejoj kaj silentantaj perantoj. Plej korrompa estas la ĉesigo de sendoj koste de ILEI al centoj da unuopuloj, centroj kaj asocioj en nepagipovaj landoj. Por protekti tiujn, ni alvokas al vi fariĝi patrono de JA, adoptante iun lernanton aŭ centron. Se tio ne sukcesos, ni perdos la tutmondecon kiun ni ĉiam pretendis kaj priferis. La revuo atingos nur kvardekon da landoj, anstataŭ okdekon. Ni dissendis kroman varbilon (kiu ne kostos al ILEI) kun JA 2003/1, invitante abonojn kaj patron-abonojn. La varbilo



estos rete akirebla en PDF-formato. Rezultoj: reage de niaj alvokoj, tri instruistoj faris novajn grup-abonojn por 50, 15 kaj 15 ekzempleroj. Afrika abonado por 150 ekz. renovigita. Komencita la savo, sed longa vojo plu!

### c) Kion ni faros?

Ni postĉasos ĉ. 300 EUR da nepagitaj abonoj el 2002. Ni instigos brazilanojn unuope aboni (ni jam kontaktis 120). La posteno de varba direktanto vakas; ni serĉas novan, prefere en plen-tarifa lando, ĉar tie trovendas la abonantoj (vidu alvokon sube). Ni starigos patronan retpaĝon, kie legeblas la adresoj de nunaj kaj estontaj legantoj, instruistoj, centroj, kiuj povus ricevi la revuon nur per patronado. Ni starigos varban ret-paĝon, de kie ŝuteblas prespretaj anoncoj, gazetaraj komunikoj, varb-konsilioj kaj -materialoj. Ni starigos perantan ret-paĝon por aŭtomatigi la konfirmon de ricevitaj abonoj kaj pagoj, limigante la kvanton da individua mesaĝado.

Jen urĝa defio. Por savi la revuon, ni bezonas novajn abonojn, patronojn, varban direktanton. Kaj ĉion baldaŭ. Post julio tro malfruus. Lastaj vivebloj por nia amiko.

*Stefan MacGill, aganta varba direktanto*

### d) Redaktora raporto

Konservante altajn moralajn valorojn, indajn al la spirito de esperantismo la redakcio volas respondi al la defioj de la moderna tempo. Tio signifas, antaŭ ĉio, strebadon plifirmigi kontaktojn kun la legantoj. Ni faros ĉion eblan publikigi pli da kontribuajoj de la legantoj laŭ ilia propra gusto kaj deziro, kondiĉe ke ili estas verkitaj en la supre menciita humana spirito kaj atingas la deziratan lingvan nivelon. Ni volas elekti temojn ĝenerale interesajn, neniam forgesante pri la rolo de la revuo: liveri lingve kaj eduke taŭgan materialon por nia nova generacio, kiu ampleksas ĉe ni multe pli vastan aĝogrupon ol la sugestita per la titolo *Juna amiko*. Samtempe ni modernigas (ĝis la limoj de niaj financaj ebloj) la aspekton de la periodaĵo, pli kuraĝe uzante novajn teknikajn solvojn, enpaĝigojn kaj forigante ciferojn post vortoj glosindaj, vertikalajn streketojn, ĝenajn por iom progresintaj legantoj, donante, tamen, piednote klarigojn per la elektitaj 1500 plej oftaj vortradikoj, escepte tiujn artikolojn, kiuj rekte celas instruistojn, kursgvidantojn.

Krom tio ni plenforte deziras subteni gravajn aktivigajn iniciatojn kiel, ekzemple, la internacian fabelkonkurson, IIK, Interkulturon, renkontiĝon de mezeŭropaj lernantoj, diversajn konkursojn, kvizojn, ktp. konsciante pri eksterordinara rolo de tiaj aktivaĵoj, kiuj finfine povas doni la unuan veran impreson, travivaĵon por komencantoj.

La redaktoro de *Juna amiko* petas ĉiujn legantojn de IPR konatiĝi kun la 30-jara revuo, uzi ĝin dum instruado kaj li atendas proponojn, konsilojn kaj kontribuajojn el la tuta mondo.

*Géza Kurucz, redaktoro <suli267@szeged.sulinet.hu>*

### e) Alvoko por varba direktanto

Plena alvoko por tiu posteno aperis en IPR<sup>6</sup> 2000/4 sur paĝo 31. La plimulto skribita tie plue validas. Detala taskpriskribo kun uzeblaj rimedoj kaj paŝoj estas videbla/petebla rete. Konkize, ni bezonas iun kun ret-aliro, en plen-tarifa lando, kiu konas varb-teknikojn, kun iom da financaj kaj ret-uzaj kapabloj. Tiu kontaktados kun perantoj kaj landaj sekcioj; kunordigos varb-kampanjojn, helpos al perantoj, tenos ties reton aktuala. La bezonataj elvenoj estas 400 plentarifaj abonoj en 2003, kaj 500 daŭre ekde 2004. La suma nombro da pagitaj abonoj tiam restu super mil. La revuo fariĝu denove por la Ligo profitiga. La direktanto kontrolos la pagitecon de abonoj, kunlabore kun la JA-administranto (anoncitaj abonoj) kaj la kasisto (alvenintaj pagoj). Kompenso povos esti nur surbaze de realaj atingoj (abonoj varbitaj super 4 aŭ 5 cent) aŭ porcio de profitoj (kiam atingitaj). Sinanoncoj kaj petoj por pliaj informoj de:

*stefan.macgill@galamb.net*

## Recenzo

*Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro, Ilona Koutny, Poznan, 2002. 16cm. 144p. ISBN 83-88518-36-4*

Jen verko kiu fontas el multjara gvidado de perfektigaj kursoj en universitata medio. Je tiu nivelo, kiam la gramatiko estas bone konata, gravas vastigi kaj fajnigi la vort-trezoron kaj ekzercigi ties uzadon en konversaciaj kaj viv-similaj situacioj. Oni deziras krome ebligi la uzon de

<sup>6</sup> Vidu ankaŭ: [http://www.nl-papa.hu/ipr/notlibro\\_00\\_4.htm](http://www.nl-papa.hu/ipr/notlibro_00_4.htm) – La Red



Esperanto por faka komunikado trans limoj. Tial la verko. Ĝi prezentas du vastajn temojn – lauplane sekvos aliaj. La ĉeftemoj havas po kvin subtemojn.

Por instruado: bazaj faktoroj, temoj-lecionoj-taksado, ekipaĵo, supera instruado, scienca vivo.

Por laboro: ĝenerale, dungo, laborkondiĉoj, oficejo, profesioj.

Sub ĉiu subtemo aperas kapvortoj, sub kiuj frazeroj kaj vortoj estas aranĝitaj en jenaj kategorioj:

- tipoj de la kapvorto
- verboj kaj verbaj esprimoj uzablaj kun la kapvorto
- adjektivoj kiuj karakterizas la kapvorton
- ceteraj vortoj kaj terminoj ligeblaj kun la kapvorto.

Esperanto servas kiel ponto inter la angla kaj la hungara – du tre malsimilaj lingvoj kun tre malsamaj kulturaj fonoj, certe en edukado. Des pli ke la verko distingas inter la brita kaj usona: precipe ĉe edukaj sistemoj la du tre diferencas, kaj ĉe strukturoj kaj terminoj. Esperanto kiel ponto havas fortojn kaj malfortojn. Ja ĝi apenaŭ havas sian propran eduk-sistemon kun maturigitaj terminoj, aliflanke ĝia fleksebleco helpas al ĝi klarigi la precizajn terminojn en la aliaj du lingvoj.

Fine de la vortaro estas riĉigaj ekzercoj, nur en Esperanto (same kiel la antaŭparolo kaj klarigoj, cetere). La ekzercoj inkluzivas vort-ekzercojn, temojn por rol-ludoj kaj prezentoj, kaj aliajn taskojn.

*Stefan MacGill*

## ***Financa raporto de ILEI, 2002***

Legi kaj kalkuli ciferojn estas amuze, sed multaj ne havas similan intereson, kaj nuraj ciferoj ne sufiĉe donas kompreneblan informon. La informoj kaŝas sin malantaŭ la ciferoj. Tial mi klarigas vorte pri kelkaj punktoj por helpi pli bonan komprenon pri la Financa raporto de ILEI.

La jara enspezo de membrokotizoj estas malpli alta ol en 2001. La kialoj estis, ke dum UK kaj Konferenco en 2001 kelkaj membroj kaj 2-3 landaj sekcioj antaŭpagis, plie, unu persono pagis dumvivan membrokotizon. La

alia kialo estas, ke nia membronombro ne kreskis, sed male, kelkaj maljunaj kaj fidelaj membroj forpasis. Ĉi tie ni trovas unu motivon varbi junajn membrojn por niaj stabileco, estonteco kaj ekzisto.

La triono de la kotizo estas de *Koleghelpa kaso*, kiu kovris membrokotizon de ne-pagipovaj landoj.

Nia organo *IPR* elspezas pli ol la ordinara enspezo de membrokotizoj. ILEI senpage disponigas la gazeton al ĉiuj membroj, redaktoroj de E-gazetoj kaj subtenendaj membroj en diversaj landoj. La sendado iras rekte de FEL, kiu presas *IPR*-n. Jen estas unu el la kialoj de nia financa malekvilibro, pli malpli simila al tiu de *Juna amiko*, kiun trafis granda deficitito kaj oni devis ellabori urĝan savplanon kun varbkampanjo por daŭre aperigi la ŝatatan gazeton.

La deficitito de *Juna amiko* estas parte influo de EUR: kiam oni ŝanĝis la valuton je EUR, tiu fakto forte frapis pagantojn - ĉiuj kostoj kaŝe kaj iom post iom altiĝis. Alia grava kialo estas evidente la abonkotizoj, kiuj tute ne sekvis la ekonomian evoluon en la mondo. Oni ne povas kovri ĉiujare kreskantajn kostojn per ne kreskantaj abonkotizoj. Por kompreni tion ne necesas esti specialisto de matematiko. Do, nia deziro estas ke la abonkotizo normaligu aŭ sekvu la financan evoluon de la mondo, plie, antaŭaj senpagaj ricevintoj helpu la gazeton per iom da pago por la ricevo. Tio estas minimuma deziro de ILEI, ankaŭ por pli bona filozofio de la vivo.

Unu alia rimarkinda afero estis ke unuan fojon kiel „unikajo de ILEI-historio” (cito de iu gravulo), post longaj diskutoj ILEI nuligis la *Konferencon* en 2002, ja mankis la konferenca respondeculo kaj ni volis eviti financan riskon (memoru, ke Konferenco en Aŭstralio rezultigis grandan perdon). Do, ni ne havis konferencan enspezon, sed pro la neokazo de estrarkunsido, ni ŝparis la estrarkunsidan elspezon. La neokazo de la Konferenco tamen estis perdo: multaj membroj demandadis, surpriziĝis, koleriĝis, seniluziiĝis.

*Fakaj kotizoj* kreskis. ILEI pagis la kotizojn al UEA (150), Komerca ĉambro (63), UNESCO (55) kaj 174 EUR por FIPLV (*Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj*).

Por „Konferenco 2003” estas venintaj aliĝkotizoj, kaj la sumo eniras ankaŭ al la *Pasivo* kiel ŝuldo, kiu estos uzata en 2003. *Librovendado* kaj *Internacia Ekzameno* donis iom da enspezo, kune 1044 EUR. Ankaŭ la *Subvencio de UEA* helpis nian malfortan financon. Iomete feliĉe la







## Estrara propono pri la membro-kotizo!

La supra raporto pri 2002 montras ke la financa stato de la ligo ne bonas. La membro-kotizo restas senŝanĝa de 1999. En 2002 intensa debato pri altigo okazis en la diskutrondo por komitatanoj: [ilei-kom]. La estraro, konforme kun la statuto, informas la komitaton, ke ĝi proponos altigon en nia julia konferenco. La proponataj sumoj estos deciditaj post pliaj esploroj kaj konsultiĝoj. Unuflanke, la kotizoj devas kovri la kostojn de kelkaj servoj kaj agadoj, ne nur unu. Aliflanke, ni rifuzas la nocion ke instruistoj estu ŝarĝitaj financi la tutan disvastigon kaj instruadon de Esperanto. Paralele kun la propono, la estraro entreprenas eĉ drastajn manierojn tranĉi kostojn, kaj invitas al la komitato taski la novan estraron krei aliajn enspezofontojn ol membro-kotizoj.

la Estraro

\*\*\*



Grazina Opulskiene, Cseh-instruistino el Litovio kun siaj gestudentoj dum la 19a Somerkursaro en Aŭstralio: de maldekstre: Myra Attwood, John Gallagher (Sekretario de AEA), June Cullen, Pat Palmer, Bradley Macdonald (prezidanto de NZEA). Grazina Opulskiene, Bill Aulsebrook, Dorothy Bysouth, Sandor Horvath, June Perkins.

## LABORKOMISIONOJ

**Ekzamena:** Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: [bmaxey@visi.net](mailto:bmaxey@visi.net)

**Elekta:** Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

**Kontrolo:** Bertil Andreasson, Lars Forsman

**Lerneja:** Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

**Regulara:** Rob Moerbeek

**Terminara:** Maŭro La Torre

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**FIPLV** (Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj)

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: [esperanto@Education.monash.edu.au](mailto:esperanto@Education.monash.edu.au)

**IEI:** Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

**UEA:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.

**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verte, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

## MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fikso kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: **Boo Mee Kim-Lindblom**, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, ✉: [boomee.kimlindblom@swipnet.se](mailto:boomee.kimlindblom@swipnet.se). Postĝirkonto: 682117-7, Stokholmo. S.W.I.F.T. - kodo: **PGSISESS**. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: **UEA**, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 32. de Jarlibro 2002. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la engago.

**Reklamtarifoj por IPR:** 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

**Hejmpaĝo de ILEI ĉe:** <http://il.uniroma3.it/ilei>

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: [www.nl-papa.hu/ipr/](http://www.nl-papa.hu/ipr/); [jozefo@nl-papa.hu](mailto:jozefo@nl-papa.hu); [jнем@uea.org](mailto:jnem@uea.org), tel/fakso: +36-89/ 356-050.

Vicedaktorino: [katalin@ikso.net](mailto:katalin@ikso.net). La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 17-an de aprilo 2003,

**redaktfino por la sekva numero: la 30-a de aŭgusto 2003.**



## SEKCIESTROJ

**Albanio:** Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana  
✉: selimib@albmail.com

**Argentino:** Teresita Alaníz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

**Aŭstralio:** Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelero NSW AU-2550  
✉: penivos@yahoo.com

**Belgio:** Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

✉: raymond.wylleman@pi.be  
**Brazilo:** Marcos Zlöv Zlotovich, C.P. 2641, BR-01060-970 São Paulo - SP  
✉: zlov1000@hotmail.com

**Britio:** Grahame Leon-Smith, The Niven Suite, The Mansion, Ottershaw Park, Surrey, KT16 0QG.  
✉: grahame.leon-smith@free-computers.org

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938  
✉: melicharkova@quick.cz

**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan  
✉: zhan@uea.org

**Finnlando:** Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito  
✉: cantskog@kolumbus.fi

**Francio:** Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,  
✉: joseph.catil@wanadoo.fr

**Germanio:** Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász  
✉: jozefo@nl-papa.hu

**Irano:** Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran  
✉: ilei.ir@esperanto.org

**Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma  
✉: pianetaurano@libero.it

**Japanio:** Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001  
✉: masumi-s@gw3.gateway.ne.jp

**Katalunio:** Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus  
✉: ileicat@hotmail.com

**Kroatio/KEL:** Anka Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb,  
✉: anka.jagnjic@zg.tel.hr

**Kroatio/KEU:** Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

**Kubo:** Pedro Fernández Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1 entre S.Allende y Lugareño, Plaza, CU-10600 Ciudad de la Habana  
✉: kubesp@enet.cu

**Nederlandio:** Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,  
✉: ieio01@tiscali.nl

**Norvegio:** Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad  
✉: bthuv@c2i.net

**Pollando:** Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

**Rumanio:** Florica Popa, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timișoara

**Rusio:** Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000  
✉: mirina@online.ru

**Svedio:** Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby  
✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

**Svislando:** Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets  
✉: mireille.grosjean@rpn.ch

**Togolando:** Attiogbe Agbemadon B., Mesah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,  
✉: esp.togo@cafe.tg

**Usono:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr. Santa Barbara, CA 93111-2521 (US)  
✉: dorothyh@west.net

## REPREZENTANTOJ

**Armenio:** Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan  
✉: LIDELB@freenet.am

**Bosnio kaj Hercegovino:** Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región  
✉: hecg@uea.org

**Estonio:** Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn  
**Islando:** Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður,  
✉: loftur@skyr.is

**Israelo:** Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer  
✉: gpsa@uea.org

**Kongo DR:** Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaire

**Korea Resp.:** CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio  
✉: shcho@inha.ac.kr

**Kostariko:** Hugo Mora Poltorneri, Apartado 4981, CR-1000 San José  
✉: miaumiaul@racsa.co.cr

**Litovio:** Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius  
✉: piliponis@centras.lt

**Meksiko (konfirmota)** José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo.

✉: jdfcorrales@yahoo.com.mx

**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1  
✉: gwenda.s@ihug.co.nz

**Portugaliao:** João Jose Santos Rua Damasceno Monteiro, 21-B r/c dto.PT-1170-109 Lisboa  
✉: maqsantos@hotmail.com

**Serbio-Montenegro:** Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, 32000 Čačak  
✉: radp@ptt.yu

**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.  
✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

**Ukraino:** Nina Daniļuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

**Uzbekistano:** Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS  
✉: eugeny@esper.gimli.com

**Venezuelo:** Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre. Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas  
✉: andesp@internet.vc